

Taiteilija ja kirjailija, keksijä ja illusionisti Markku – Tapio Sarastamo (s.1948) on luonut niin lapsille kuin aikuisillekin suunnatun fantasiakirjan "**Kreivitär ja hänen huikea elämänsä**".

Päähenkilö seikkailee naivistisen älykkäässä unenomaisessa maailmassa erilaisten tosi- ja satuhahmojen seurassa (lukijan pohdittavaksi jää kumpia kutkin ovat). Lempeänjännittävä tarina on opettavainen ja viihdyttävä, ainutlaatuinen kuvitus ryhdittää kertomusta ja vie lukijan syvemmälle tekijän fantasiamaailmaan.

Vaikka tarinan fyysisiä ulottuvuuksia voi pitää lähinnä kosmisina, löytyy siitä kuitenkin kosketuspintoja arkimaailmaamme. Erikoisten sanojen ja käsitteiden luettelo kirjan lopussa on mielenkiintoista luettavaa itse kullekin.

Kirjan kääntäminen esperantoksi, puolalaisen silmälääkärin Ludovic Lazarus Zamenhofin 1870-80 kehittämälle kansainväliselle kielelle lienee ennennäkemätön kulttuuriteko. Teos tarjoaa siis myös rautaisannoksen ainoaa elossa olevaa keinotekoista kansainvälistä kieltä.

Tero Sallamo, toimittaja, kääntäjä

Artisto kaj verkisto, inventisto kaj iluziulo

Markku – Tapio Sarastamo (n. 1948) kreis kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj fantazian libron **La Grafino kaj shia fantasta vivo**. La protagonistino aventuras en songheca mondo naive inteligenta, akompanate de diversaj nefikciaj kaj fabelaj estajhoj (la leganto mem cerbumu, al kiu kategorio chiu el ili apartenas). La tenere ekscita rakonto estas instrua kaj distra, unikaj ilustrajhoj vigligas la okazantajhojn kaj kondukas la leganton pli profunden en la fantastan mondon de la auhtoro. Kvankam la fizikaj trajtoj de la rakonto povas esti konsiderataj preskauh kosmaj, kontaktoj kaj similajhoj ankauh al nia chiutaga vivo troveblas. La finna listo de specialaj konceptoj kaj vortoj meritas la intereson de ajna leganto.

La esperanta traduko de la libro estas nova kultura atingajho. Ghi proponas bonan porcion de la dauhre vivanta kaj evoluanta internacia lingvo, kiun iniciatis en la 1870aj kaj 1880aj jaroj la pola okulisto Ludoviko Lazaro Zamenhof.

ISBN 951 – 98395 – 5 – 0

MARKKU SARASTAMO
KÖNNÖLÄNMÄENTIE 5
14500 IITTALA
sarastamo@gmail.com

© MARKKU SARASTAMO
2011-02-25

ADR.
MARKKU SARASTAMO
KÖNNÖLÄNMÄENTIE 5
14500 IITTALA

FINNLANDO.

KOTISIVUT:
www.sarasta.fi

pagho 3
Motto:
"KIA LA SEMO
TIE LA FRUKTO!"

DEDICHO:
AL TALVIKKI KAJ ALIISA
KUN AMO
EN HÄMEENLINNA
10/10 2005
EN LA TAGO DE ALEKSIS KIVI
MARKKU - TAPIO

pagho 4

GRAFINO KAJ SHIA FANTASTA VIVO

KAJ TIEL CHI GHI KOMENCIGHAS:

NOKTO EN LA FOINEJO


En iu nebula mateno Malgranda Pirolo - la chefrolulino de tiu chi rakonto - vekighis en foinejo, kie shi la antaŭhan vesperon endormighis, post longa observado de la vivo de birdoj. Sentante sin malvarma kaj ankoraŭ dormema shi ektrotis laŭ la pado de la foinejo direkte al sia hejmo kaj devojighis.

Chiuj vilagĥanoj serĥis shin, maltrankvilaj pro shi. Oni bone konis shian kutimon malaperi al kuriozaj ekskursoj, kaj tial shia panjo en sia koro sentis, ke chio estis en ordo. Tamen la animon de la panjo pezis nekutima zorgeto, same kiel tio pezus ajnan patrinon, kies infano subite malaperis kvazaŭ englutita de la tero.

KRIPLA LEPORIDO

Okazis tre stranga afero. Kiam Pirolo, enpensighinta kaj frumatene, trotadis lauh la enarbara pado, lamis renkonte al shi vundighinta leporido kaj ploris korshire. Ekvidante Pironon ghi timighis, kiel leporidoj kutimas, se ili vidas ion novan kaj nekonatan.

Pro la ploro nebulighis la vidkapablo de la besteto, kaj nur post kiam Pirolo vishis ghiajn bluetajn okulojn per sia blua plortuketo broderita per punto, la leporeto povis klare vidi.

Kaj kion ghi vidis! Sur la arbarpado staris knabineto kun malgranda rugha ledsako surbrake kaj binoklo pendanta che la kolo. Shi surhavis flavan floran sonorilforman jupon kaj orkoloran hararon. Nenion tiel belan la leporido neniam dum sia antaŭa vivo vidis!

Unu el la kvar piedoj de la besto krukmuzela shajnis malbonaŭgure shvela, kaj surbaze de sia propra sperto Pirolo suspektis, ke ghi elartikighis. Rompita ghi ne estis, ĉar la aminda hela kaj ronda peltulo brave staris sur siaj kvar piedoj. Lerte Pirolo splintis la shvelintan piedon de la kompatindulo per disbranchighinta salika bastoneto, lauh instrukcioj ricevita dum sukurado-kurso de la Rugha Kruco.

pagho 6

APERAS BONA FEINO

Kaj nun timighis Pirolo! La leporeto komencis paroli homan lingvon per fea-gnoma voĉo. Ghi diris, ke ghi ne vere estis leporo sed feino, sorĉe kondamnita saltkuradi sur la pado ĉiutage de mateno ĝis vespero, ĝis kiam iu bonkora homo helpos shin.


Nur ĉasita de homoj kaj hundoj kaj alpafita kiel manghotajho shi ĝis nun estis!

Kiel rekompenco pro la bonfaro la helpintino nun havas la rajton eldiri du dezirojn, kaj la deziroj plenumighos. Pirolo ja antaŭe auhdis pri miraklofaraj feoj kaj enlampaj spiritoj kaj nebulecaj magiuloj loĝantaj en malnovaj boteloj, sed kia surprizo nun vere renkonti Bonan Feinon! Tio estis jam tro por shi, kaj shi solvis la embarason tiel, ke shi svenis!

Rekonsciighis la knabineto post ioma tempo, pensante ke ĉio tio estis nur songho, kaj shi ekesperis, ke shi vekighos en sia propra lito hejme. Sed ne! La leporeto per sia rozkolora langeto lekadis shiajn brovojn kaj tenere parolis al shi. Efektive! Apud shi kauhriis parolanta leporido, kiu envere estis feino!

VEKIGHO

Pirolo pinĉis sian brakon por esti certa, ke shi maldormis, sed tio nur doloris. Cetere, ĉu oni ne povus havi ankauh tian songhon, ke oni vundas sin kaj sentas la doloron?



"Estu kiel ajn", pensis la knabineto, "iel tio tamen estas!" Se mi nun songhas,

tio estas bona songho kaj akceptinda. Ankauh hejme ne chiam estas agrable. Ech ne ekscite.

Sed kion mi deziru, sin demandis la ghoja knabineto en la flora sonoriljupo kaj charme-dance iom turnighadis sur la pado.

Se mi petus, ke mi estu princino! Ne, ne! En chiu fabelo trovighas princino. Princineco finfine tedas. Sed farighi regho estus amuze! Auh se mi petus, ke mi farighu marvirino. Aliflanke, mi ne bone naghos kaj karesi shlimajn fishojn ne estas tre agrable, pensis Pirolo.

pagho 7

LA DEZIROJ

Tiel la knabineto cerbumadis, kaj duonhazarde shi elbushighis, ke shi shatus farighi Grafino! Per majuskla G!!!

Shi ne estis tute certa, kion la vorto signifas, sed evidente ion elegantan. Sur bela fremdlanda fromaghpacko shi iam vidis bildon pri Grafino. Elegante vestita virino en la bildo turnadis pluvombreton.


Shi estis akompanata de sovaghmiena servisto, kaj apude petola simio ludis akordionon. Tia ankauh Pirolo shatus esti. Krome, almenauh simioj estas sufiche drolaj. (Vidu la kovrilbildon!)

Kaj samtempe la tuta mondo turnis al Pirolo la kapon. Shi vidis tutan gamon de chielarkaj kaj sunaj koloroj dum la feina vocho pludemandis, kio estas shia dua deziro.

Rapidu nun, pensis la knabineto, antauh ol la songho finighos. Kaj shia dua deziro estis havi sekuran kaj senzorgan vivon, kie shi havu chirkauh si multajn felichajn homojn kaj bestojn. Auh chu shi tamen deziru havi elektran mopedon? Bonshance la feino malauhdigis chi tiun pensachon.

Poste okazis io tute stranga. Nenion similan Pirolo antaue auhdigis.

De ie malproksime auhdighis la vocho de la leporfeino kvazauh el spacospirala arghente griza shelo de perlokonko. Samtempe la mondo komencis refarighi reala sed tute alia ol tiu, al kies vidajhoj Pirolo antaue kutimighis.



Tiu chi nova mondo propra al shi estos la roza Grafina mondo plena de amo!

pagho 8

GRANDA FLUGO

Kun surprizo Pirolo rimarkis, ke shi jam vertighe flugas chielen, tirata de giganta bunta flugilhava kajto. Sub si shi vidis la tutan vilaghon, verdajn valojn, altajn montdeklivojn, kastelojn kaj bienegojn. De fore auhdighis la vocho de la leporfeino:

" Chion tion chi vi posedos kaj multon alian. Rigardu pli foren! Tie malproksime ekvideblas via kastelo, kun servistoj kaj pavilono, sed tiun chasistan chaleton mi detruos, char vi ne bezonos ghin. Armiloj ne troveblas en la kastelo, escepte de mezepokaj lancoj, batalhakiloj, shildoj kaj kelkaj muzeaj pafiloj shargataj


per nigra pulvo tra la tubofino. Ili ne plu funkcias, kaj se oni tushas ilin, ili shanghighos en herbejajn florojn. Al ili faru kion vi deziras. La nuraj veraj armiloj, kiujn mi disponigos al vi, estas Amo, Toleremo kaj Komprenemo. Ili portos vin foren."

Pli kaj pli alten levis la kajto malgrandan Pirolon. Kaj subite komencighis nekomprenebla transformigho. Malgranda Pirolo plialtighis, shia hararo plilongighis kaj bukligis, kaj shi ekhavis tute aliajn vestajhojn. Chirkauh shiaj pojnoj kaj fingroj kaj sur shiaj auhrikloj shovighis belaj ornamajhoj, shian kolon ekchirkauhigis koliero el brilaj perloj. Dum la ornamajhoj shutighis sur shin, komencighis rapida malsuprenigho direkte al la terglobo, kiu ne shajnis pli granda ol piedpilko. "Okazu kio ajn, io tamen nun okazos!" kriis Pirolo al monedaro preterfluganta.

Kaj POPS! Pirolo farighis vera Grafino. Kun miro kaj ioma konfuzo shi en sia nova vesto ekghuis la vidajhon el la fenestro de sia pavilono.

pagho 10
VERA GRAFINO

La mirigita Grafino, char tio shi nun estis plenkreskule vere, rondiris en sia vilao. Shi admiris sian dormochambro kaj ties baldakenlito, kies lerte tajlitaj kverkaj fostoj subtenis arte teksitan baldakenon kun luno kaj steloj



konkure dancantaj. Che la randoj pendis trembrilantaj oraj kvastetoj. Super chio tio staris ora statuo pri aglo, kiu gardis la dormon de la dormanto. La lavchambro estis kahhelita kaj lerte dekoraciita per orfoliajhoj. La kranjoj de la dusho estis el pura oro kaj muntitaj per verdaj emeraldoj. Surplanke en la halo antauh la lavchambro kushis grandega persa tapisho, kies figurajhoj igis shin pensi pri siaj infanaghaj salamoniak-bombonoj.

La plej granda surprizo al la grafino estis la vestejo de la nova vilao kun pordo al la dormochambro. La plej atentokapta meblo en la vestejo estis grandega kverka vestoshranko. Sur la vestarkoj pendis plej mirindaj modajhoj: moveblaj longaj kolumoj el punto kaj pelto, strutplumoj kaj juveloj arte aranghitaj. Multspecaj gazoj kaj vualoj okupis grandan spacon. La Grafino staris antauh tiuj chi mirindajhoj preskauh spiromanka.

En la alta dormochambro, kies plafonon subtenis ionika kolonaro, shi trovis malnovan radshpinilon, kun granda bulo de plej fajna linfadeno kaj dekoracia shpinbreteto belege tajlita kaj orumita. Troveblis tie ankauh konuklo argehentumita. La Dipatrino en la murangula ikono de malantauh abelvaksa kandelo shajne ridetis.


Antauh la fenestro farita el multaj diverskoloraj pecoj de vitro staris triparta faldebla ekrano, en kies vitraloj kapriolis aglo kun du fishoj kaj fulmo.

La dormochambro prilumis nur oleolampoj, kies mallarghaj vitrotuboj malhelis pro fulgo sed en la konveksaj brilaj latunspguloj reflektighis chio renverse.

La dormochambro odoris je orienta parfumo, kaj tio agrable vibrigis la hauhton de la Grafino. Ech malpli fortaj travivajhoj ja povas konfuzi komencantan Grafinon.

pagho 11

Post la peza tago de sinorientado la Grafino dormis sian nokton trankvile. Shia nova hejmo estis vere kvieta kaj plena de paco. Shi ankoraŭ sentis sin tiom



identita kun la malgranda Pirola-knabino, ke shi songhis parte kun shi kaj ne maltrankvilis, sed aliflanke shi ne estis certa, kiu el ili du nun songhas: la Grafino en sia baldekenlito aŭ la malgranda Pirola sinkashinta sub la pajlajho en la fojnejo.

NOVA MATENO

La Grafino tre frue ellitighis. Unu kialo estis la matenveka signalo de Koko Kokeriko, longe kaj tremante ehhanta tra la tuta korto. Ghi penetris ech pli foren, ghis la proksimajho de la Nebulmontaro.


Shi vestis sin per la vestajhoj alportitaj sur la vestarkon far de servisto nerimarkite vizitanta la chambro: mantelo el plej fajna lino, kun manumoj ornamitaj per folkloraj rubandteksajho kaj rugha lilio-motivo surbruste. Siajn piedojn la Grafino enshovis en hejmecajn sandalojn, kaj sian hararon shi kovris per silka tuko, kie estis desegnitaj du kapreolidoj petolantaj en oazo sub stelplena orienta chielo; la fromaghkolora luno strange oblikvis, kiel la gudrita boato de shia avo.

Shajnis al shi, ke io ankoraŭ mankis al la vesto. Post ioma hezitado shi malfermis la ebonan kesteton de la spgultablo. En ghi shi trovis etan kristalflakonon, kaj per ties ekologia parfumo shi malpeze shmiretis la malantaŭon de siaj oreloj. Tion farinte shi sentis sin vera Grafino.

Kaj nun ek! Sed kien? Kion Grafinoj kutimas fari matene? Chu shi iru inspekti sian bienegon kaj konatighi kun la mistera liliputpopolo Flarsuloj kaj Kisruloj? Chu shi iru karesi la lamojn kaj precipe la plej shatotan Grafinan rajdbeston Egotrip la Unuan, grandokulan kaj bonodoran chevalchjon, kiun plenkreskuloj verdire nomis lamo?

pagho 13

La Grafino malsuprenighis al la teretago kaj eldomighis. Shi plupashadis laŭ pado kondukanta al bovineja konstruajho. Tie oni jam plenenergie laboradis. La malgrandaj homecaj Flarsuloj kaj Kisruloj purigadis la stalon, strigladis la rajdbestojn kaj portadis sekigajhojn en la stalfakojn.



Kiam la spanon-altaj uletoj rimarkis la Grafinon, ili gventile salutis shin per "Bonmaten", dancis mallongan polonezeton kaj poste dauhrgis siajn okupojn, kvazauh neniu estus enirinta ilian laborejon.

La Flarsuloj kaj Kisruloj aspektas iom kiel ordinaraj gnomoj kaj ili vestas sin kiel homoj aŭ feoj, sed ili altas ne pli ol malgrandaj laktokruĉoj. Ili loĝas en nestoj, kiujn ili konstruis en la stalo. La formoj kaj grandeco de la nestoj varias. Ili estas plektitaj el pajlo, kaj unuj pendas en la jungilaro ĉe la stalplafono, dum aliaj troveblas en murkavoj de subtera grotaro.

LA RAJDBESTOJ EN LA STALO


Kaj kiel ni priskribu la rajdbestojn? Ili aspektas tre amuze! Ili havas altajn kolon kaj krurojn. Ili grandaj okuloj rigardadis la Grafinon scivole, kaj iliaj grandaj oreloj turnighis al ŝi. Malkiel la ĉevaloj, ili remachis sian matenmanghon, kaj iliaj makzeloj drole movighadis de flanko al flanko. Ili povis elsputi bonodorajn mukbuletojn je plurmetra distanco. Tiel ili salutis la vizitantojn .

Vidighis diverskoloraj rajdbestoj: rughetaj kaj longharaj, aliaj tute nigrablankaj, kaj pliaj kovritaj de ora lanugo, kun longa lerte plektita vosto. La Flarsuloj kaj Kisruloj nomis ilin lamoj. Iliaj praavoj venis de Sud-Ameriko, de la aridaj Andoj. Tial ilin kovris longa varma lano. La kastelanoj ŝpinis la lanon de la lamoj por fari el ghi varmajn ŝalojn, puloverojn kaj plejdojn por sledvoĵaghoj.

pagho 14
AMIKECO

La Grafino tuj ekshategis la lamojn. Ankauh la lamoj tuj amikighis kun ŝi. La liliputoj ekridis pro felicho vidante tian reciprokan amikecon. Denove ili prezentis mallongan dancon. Malantau la dancantoj nun muzikis ilia propra liliput-orkestro: trumpeto, tamburo kaj nekutimaj kordinstrumentoj kaj klaviceno. La danco estis malnova hispana rondodanco, zarabando.

Surprize lauhte la orkestro ludis, kaj ankauh la bestoj en siaj stalfakoj



svingadis siajn kolojn laŭ la takto. La muzikado kaj dancado ne longe dauhris, ĉar la Flarsuloj estas tre diligentaj kaj konsciencaj pri sia laboro. Post momento en la stalo resvingighis balailoj, la plankoj kaj sterkokanaletoj estis ŝprucigataj per akvo kaj pinosapo. Ĉien disshvebis la misteraodoro de pureco kaj felicheco, odoro de neniu gauhgho rekonebla.

La Grafino estis ege felicha pro chio vidita. Precipe la konscienca diligento de la liliputaro neforgeseble impresis la mastrinon de la vilao: tia stabo vere estas fidinda.


pagho 17

La Grafino amikighis precipe kun unu grandokula lamo, kiu dekomence sentis "varmajn kaj ankoraŭ ne-esprimitajn sentojn" pro ŝi. La grandokula lamo lekis la mandorson de la Grafino kaj volonte akceptis fasketon da karotoj, proponatan de la Grafino kiel interkonan donacon. La lamo nomighis Egotrip la Unua kaj ghi jam distingighis en pluraj belulin-konkursoj. Aldone, ghi sciis kanti nuntempajn modkantojn kaj malnovajn baladojn en la internacia helplingvo esperanto, ne paroli pri ghia kapablo vetnaghi! Tiu chi lamo havis specialan prestighon en la kastelo. Ghia stalfako estis klimatizita kaj parfumata per orientaj odorigiloj. Oni treege esperas, ke tia prizorgado helpos ghin naski malgrandajn lamidojn.

Egotrip la Unua estas speciale priatentata de la liliputoj, kaj krome, ghi farighos la persona rajdbesto de la Grafino.

GVIDATE DE GROTHUNDO

La sekvan matenon venis al la Grafino anhelanta hundo, rase grothundo, nome Reks. Dum la matena rondkurado ghi renkontis la Roselfinon de la Nefora Fonto, kaj nun la Elfino invitis la Grafinon senprokraste konatighi kun la kastelo kaj ties proksimajho. La Parolanta Grothundo petis la Grafinon profiti de la pied-pedale movata flugaparato parkita sur la ekflugobazo de la vilao. Tiel la Grafino plej bone plukonatighos kun sia bienego kaj transflugos la



varmbedojn rekte al la ghardeno.

La Grafino kun la Grothundo Reks do suprengrimpis sur la tegmenton de la vilao kaj trovis tie hezitigan flugaparaton kun instrukcioj. Kuraghe la Grafino sidighis che la stiriloj de la stranga inventajho. Ŝi ligis la Grothundon malantaŭ sian dorson per zono, kaj lasis la mashinon jhetighi en la krutan ekflugejon, kiu saltigis ilin al la dise shvebantaj somernuboj kotonblankaj. La grothundo Reks ech pli timis ol la Grafino. Aerkavoj skuadis la fragilajn flugilojn de la malpeza libeleca veturilo. Komence la veturado shajnis chiel malsekura.

Kiel piloto la Grafino jam spertighis: Shin ja levis la giganta kajto tiel alten, ke la mondo en shiaj okuloj tiam aspektis malpli granda ol piedpilko.

pagho 18


KASTELAJ GHOJOJ KAJ RUTINAJHOJ

La gajaj etaj Flarsuloj kaj Kisrujoj triumfe aplauhdis, kiam la flugaparato de la Grothundo Reks kaj Grafino surterighis meze de la ghardeno, ghuste apud la

fontano, kaj ambauh tute malsekighis pro la sprucheroj.

La Grothundo Reks post la flugo unue tremetadis momenton, skuante sian kapon tiel, ke la oreloj kurioze frap-frap-frapis. Baldauh ghi tamen gaje babilante saltetadis chirkauh la Grafino kaj lekadis la Flarsulojn kaj Kirsulojn, kiuj estis apenauh pli altaj ol ghi kaj kiuj treege ghojighis pro ghia alveno. Ili chiuj deziris vice rajdi la hundon, sin tenante je ghiaj dikaj rufaj nukharoj. La Grafino ekkonatighis kun la varmbedoj de la kastelo. Ili estis enormaj, samgrandaj kiel piedpilkejoj. En ili estis kultivataj kuracherboj kaj herbejaj floroj. La herboj estis enpakotaj en saketojn kaj vendotaj en la tuta mondo por kuraci la strangajn dolorojn de homoj loghantaj en foraj landoj, kiel ekzemple dormokokon, hiplopoplo-febron kaj rozan ostfeblighon kauhzitan de amomanko.

La herbejajn floroj oni uzis por la bezonoj de la parfumlaboratorio. La parfumo de la kastelo estis mondfama. Ghi estis farata el puraj naturproduktoj. En la



fabrikado oni uzis nek kemiajn aldonajhojn nek bestajn sekreciajhojn, kaj oni ne testis la parfumon sur animaloj. La Grafino opiniis, ke bestoj rajtas vivi sian propran vivon, la homo ne suferigu ilin nenecese pro siaj vantaj homaj bezonoj. La Grafino trovis chion tion ege grava.

Aliflanke shi ege aprezis ankauh purajn odorojn kaj belajn kolorojn. Tiajn oni produktu bonhumore kaj kun honesta konscienco. "La mondo shanghighas, shanghighu ankauh ni!" opiniis la Grafino.

pagho 20


Flarsuloj kaj Kirsuloj chicheronis la Grafinon tra la tuta kastelo, montrante jen chambretojn jen chambregojn altajn kiel domoj. Sur la muroj pendis malhelighintaj portretoj pri praavoj en orumitaj kadroj. La blazonchambro estis ornamita de plej kuriozaj lignaj blazonoj, kaj la librejo odoris je mucida papero. Shi rimarkis ke la tolajh-lavejo kaj kaj la kalandrilejo estu plej eble baldauh ventolataj.

La liliputoj estis tre diligentaj. Neniom da mallaboremo ili toleris. Baldauh la kastelon plenigis iliaj laborkantoj. De chie auhdighis energia prolabora bruado kaj priaj paroloj. Ne necesas mencii, ke jam post unu semajno la kastelo brilis de pureco, la ghardeno estis elsarkita kaj la arboj pritranchitaj.

En la parfumlaboratorion oni portis brakplenojn da freshaj floroj, kosmaj lilioj kaj hiploj. La liliputoj lernigis al la Grafino, kiel distili el tio mild-odoran sed ekstazigan ekoparfumon, la marko estas Auhro I.

Parfumfabrikado ne estis vana okupo. La multspecaj bonodorajhoj produktitaj en la kastelo estis vendataj al foraj landoj, al princoj, maharaghoj kaj shejkoj. Per la enspezoj de la parfuma kaj kuracherba komerco estis kovrataj la elspezoj ne malgrandaj kauhzitaj de la bontenado de la kastelo!

De longa tempo la kastelo rimarkeble kadukighis. La lignaj shindoj de la tegmento devus esti renovigataj, la akvotuboj shtopighis de rusto, kaj la



pumpiloj de la irigaciaj kanaloj ne plu movighis pro la manko de prizorgado.

Ekdoloris al la Grafino la kapo, kiam shi cerbumis, kiel kaj kial shi falis en tiun chi ghenan situacion. Chu estintus pli bone, ke shi ne helpu la kompatindan lamantan leporon? Chu shi prefere ne endormighu kaj songhu en la foinejo? Aliflanke, teda kaj malfacila la vivo povis esti ankauh sur la hejmpado. La samajn arbarbestojn oni havas kiel kompanion ankauh chi tie. Rimarkinte la maltrankvilighon de la Grafino la liliputoj portis al shi glaseton da refreshiga trinkajho infuzita de la spicherboj de la propra bieno. Ghi tuj efikis.


pagho 22

NOVAJ DEFIOJ

La Grafino pensis, ke la situacio estis malfacila sed ne senesperiga. Pro iu kialo nekonata al shi shi nun simple farighis Grafino. Tute same kiel iu alia farighis tornisto, frizisto auh prezidento. Oni povas farighi selisto auh lernanto, knabino auh knabo. Pli bone akcepti la situacion tia kia ghi estas. Sed kion shi nun faru? Unue, shi zorgu, ke shi mem sentu sin bone. Poste shi havos tempon kaj forton prizorgi ankauh siajn proksimulojn. Kastelo kia tiu chi estas tre laboriga! Ech hejme, en la dometo konstruita en la korto por ke la infanoj ludu en ghi, oni devis multe labori por teni ghin kaj ties chirkauhajhon puraj. Kelkfoje shajnis al shi, ke la gazono tie kreskis en unu semajno tiom kiom shi dum sia tuta vivo. Almenauh shajne. Ho kiom peze estis pushadi la gazontondilon!

Nun certe estos plej bone komenci sisteman purigadon, inventaron kaj inspektadon de chio.

Tiel cerbumis la Grafino, ligis sian hararon per silka tuko, surmetis sian laborveston kaj ekserchis la liliputojn por ke ili helpu kaj konsilu shin. En la kastelo la uzo de papero estis porciumita, char blanka papero estas farata en maniero, kiu malbonigas la kvaliton de la elira akvo. Tial nur memfarita griza papero estis uzata en la kastelaj laboratorioj. Ghi ne tauhgis por notoj. Tial



la kastelanoj por siaj notoj uzis ardezon, sur kiun ili skribis per grifelo.

La Grafino do prenis ardezon subbraken por fari siajn notojn, kun firma decido alfronti la novajn defiojn de la tago.

"Plej gravas decidighi", pensis la Grafino, kaj eliris el sia chambro, vigla kaj

konscia pri siaj nunaj devoj.

pagho 23

LA TIMIDA KAVALIRO EKVETURAS

Transe de la fora Nebulmontaro la Timida Kavaliro auhdis, ke al la kastelo venis Grafino.

Li vekis sian rajdlamon frue en la mateno kaj sciigis ghin pri sia intenco iri renkonti la Grafinon. La bonega rajdbesto rughighis pro ekscito: ankauh ghi vidos veran Grafinon!

La Timida Kavaliro jam tute tedighis pro sia soleco kaj deziris vidi chirkauh si vervan vivon. Li supozis, ke en la kastelo verva vivo nun superabundas. Almenauh en la pasinteco oni neniam enuis en la kastelo. Tute male! Tie chiam okazis io kaj chiu entuziasme aktivis.

Krome, pensis la Timida Kavaliro, la Grafino povos profiti de viro sentima kiel li: "Mi povos almenauh riparadi kaj plibeligi la kastelon dum grandaj heroajhoj atendigas sin."


Tiel diris al si la Timida Kavaliro, kaj supozeble li tion ankauh lauhte diris, char la lamo ree rughighis.

La Timida Kavaliro selis sian lamon kaj komencis sian longan rajdadon al la kastelo de la Grafino. Kun si li prenis la Manlibron de Chiu Kavaliroj. La floroj en la herbejo humile klinis sian kapon por montri sian respekton. Citronflavaj papilioj dancis al li jhuslernitan papilian popoldancon, la pli bonan Sara-polskon, kaj kune kun la zumantaj burdoj deziris al li bonsanchon kaj felichon por la vojagho.

ENAMIGHO

Frumatene la Grothundo Reks dentotire vekis sian mastrinon kaj provis multesprime klarigi al shi, kiom necese estas matene rajdi, kaj ghuste nun, por vidi la sunon levighi super la Nebulmontaron.

La vetero estis belega. Estis nek tro varme nek malvarme. Birdoj kantadis,



papilioj flugadis kaj burdoj ekzercis sin pri zumado. Se oni estos bonshanca, oni auhdos la grilojn akordigi siajn archojn kaj vidos la grandiozan sinjhetighon de la turfalko el la alta chielo.

pagho 27

Rapide la Grafino komprenis, ke ili tuj ekiru. Shi ja dumnokte vidis kuriozan auhgursonghon, en kiu shi renkontis ion, kio aspektis kiel fishajha ladskatolo, chevalo kaj egreto. Aldone, la stranga kombinajho kunhavis glavon kaj pikstangon!

La Grafino ne povis kompreni, kio tio povus esti. Shi sentis egan ridemon kaj nur pene detenis sin. Al Grafino ja ne konvenas konduti kiel frivola knabineto, kio shi fakte estis.

La Grafino petis la Flarsulojn kaj Kisrulojn seli Egotrip la Unuan, kaj malrapide shi ekrajdis direkte al la Fora Nebulmontaro, akompanate de la Grothundo Reks.


Tute senscia pri la Timida Kavaliro la Grafino ghuis la rajdadon. Shi auhdigis la spiradon de la lamo, la zumadon de la burdoj kaj fine ech la sonojn de provludanta archokvarteto de la griloj.

La suno brilis de sur sennuba chielo kaj la profilo de la Fora Nebulmontaro ighis pli kaj pli klare distingebla che la transa rando de la verda ebenajho.

Ech ne Flarsuloj kaj Kisruloj eksciis, kio fakte okazis dum tiu vojaĝho. La Grothundo Reks silentis pri tio kiel la pratempaj muroj de la kastelo. la stranga ekscitigho tamen plenigis la kastelon post la ekskurso. Auhdigihis mistera flustrado el la nestoj de la malsovaghaj kastelratoj kaj el la chelaro de la liliputoj.

Post la rajdekskurso blankaj leterkolomboj pli kaj pli ofte vizitadis la kolombejon de la kastelo, kaj nokte oni povis auhdi plumon skrapeti amoplenajn vortojn sur blankan pergamenon. Leteroj tien reen flugadis: dumnokte transportataj de vespertoj, dumtage de kolomboj.

La Grothundo Reks estis kontenta pri la okazintajhoj. Sen vorta interkonsento ghi rajtis profiti de la grafina banchambro, kiam la Grafino ne estis hejme. La



Grothundo Reks shategis tiujn chi chiu semajnajn senurghajn lavmomentojn.

La italaj arioj kantataj de ghi en la bankuvo auhdigis ech en la nestoj de la liliputaro.

pagho 29

FIANCHIGHO KAJ GEEDZIGHO

Kiel ni scias, la Timida Kavaliro nur unufoje renkontis la Grafinon. Tio okazis, kiam ili - sensciaj unu pri la alia - preskauh rajdkoliziis sur la erikejo dum la unua ekskurso de la Grafino al la Fora Nebulmontaro. Kuraghite de tiu travivajho kaj de sia sento pri ilia egaleco la Kavaliro denove trotigis sian lamon direkte al la grafina kastelo, dum en la kastelo la Grafino en sia koro sciis, ke li estas venonta. La Timida Kavaliro kunportis bukedon da rughmielaj Kosmaj Lilioj.

Poste okazis mallauhta kaj mistera svatigho, sed la enhavon de tiu amkonfeso konas nur la Grafino kaj la Timida Kavaliro. Ili interkonsentis vivi sian tutan vivon kune, kiel samfamilianoj kun la kastelanoj.

La aferoj ekrulighis nekredeble rapide. Parte dankendas la Flarsuloj kaj Kisruloj. La liliputaro nome chion aranghis. Ili ripetadis al la Grafino, kiom grave estus, ke en la kastelo ekloghu iu granda kaj fortika viro, kiu povus

helpi ilin en ilia chiutaga klopodado kaj kiu distrus la Grafinon, kiam ŝi sentos sin soleca en la salonegoj de la ŝtonkonstruajho. Ili demandadis, ĉu vere plachis al ŝi manghi ĉiam sola ĉe la tablego, kiu povus sidigi almenaŭ cent manghantojn.

Do, okazis ke la Grafino komisiis al la liliputaro aranghi grandan feston. Ili purigu kaj poluru ŝiajn posedajhojn, purigu la oleolampojn, briligu ties fulgajn vitrotubojn, kaj la latunspguloj glimu kiel oro. La lamoj havu la plej bonajn manghajhojn kaj bonodorajn sekigajhojn. Sin mem ili festvestu kaj regalu per la plej bongustaj frandajhoj.

Neniu festo estas vera festo, se la bestoj ne partoprenas. Tial la Grafino bele tondetis la pelton de la Grothundo Reks kaj veturigis ĝin al la plej bona fotografisto de la regiono, por ke ĝi estu eternigata sur kolorfilmo.

Reks komprenis la gravecon de la evento, kaj longe sed ne tro laulte ululante ĝi petegis al si grandan fumajhitan oston manghotan dumvoĵaghe en la kalesho.

(sähköpostin osa kaksi:


pagho 32

Egotrip la Unua estis felicha. Pro kialo nekonata al ĝi ĝi estis superabunde dorlotata. Liliputoj masaghis ĝiajn sensentighintajn muskolojn kaj raspis ĝiajn hufojn per arĝenta raspilo. Ĝiaj vosto kaj kolhararo estis bele plektitaj kaj ĝiajn okulharojn oni malheligis kaj briligis per misterajho farita en la grafina laboratorio. La rajdbesto zumadis modkantojn en esperanto, lingvo bone konata de la liliputaro, kaj primemoradis poemojn aŭhditajn antaŭ nelonge, ekzemple tiun ĉi el Kalevala:

"Menso mia estas ema, cerbo mia certe celas kanti nun, komenci ruli tiujn...".

Dume la Grafino esploris la enhavon de sia vestoshranko. Troveblis tie multspecaj vestajhoj: longegaj moveblaj kolumoj, vualoj, bretplenoj da ŝuoj kun altaj kalkanumoj, kun malaltaj kalkanumoj kaj tute sen kalkanumoj. Iuj ŝuoj kudrile pintis, aliaj rondis, duonrondis aŭ aspektis kvarangule. Ŝi demandis al si, kiajn piedojn la ŝuisto celis. Ŝi mem ne povus fari eĉ unu pashon per ili.

La Grafino volonte elektus krokodilledajn piedvestojn, sed ŝi tamen memoris, ke la krokodilo estas protektata besto formortonta ĝuste pro virina vantemo. Tial



ŝi elektis paron da tajloritaj botetoj, kies plandumoj estis alfiksitaĵoj per lignaj najloj.

Malantaŭ sia ekrano la Grafino longe provadis diversajn vestajhojn el sia ŝranko, kaj fine ŝi sukcesis kunmeti ne tro okulfrapan sed tamen festan, neforgeseblan kombinajhon. Tio estis vera tavolo sinvestado!


Sur malpezan bluan pantalonon shi metis preskauh travideblan floran jupeton kun strikta bluzo, kaj sian kolon shi chirkauhigis per longa movebla ajho, kiu aspektis iom kiel molhara rauhpo. Sur sian kapon shi metis fajrorughan chapelon kun larghaj randoj, ornamitan per remburita serpento kaj strutplumoj. Por sia brusto, ghuste sur la koron, la Grafino elektis el sia kolekto ordenon de libertornistino kun purpuraj Kosmaj Lilioj!

Al siaj oreloj la Grafino metis grandajn orajn ringojn kun inkrustitaj verdaj emeraldoj kaj rughaj rubenoj en serpentaj vicoj. Che siaj pojnoj tintadis braceletoj el pura arghento kaj en shia brocho fajreris diamantoj kaj safiroj. Longege la Grafino turnighadis antauh la alta tualetspegulo, antauh ol shi kontentighis pri la spegulajho.

pagho 35

Kaj kial shi tiel longe elektadis kaj provadis? Tial, char okazos la fianchigo kaj geedzigo de la Timida Kavaliro kaj la Grafino! Ili interkonsentos kunvivi kiel geedzoj, kiel viro kaj virino. Kiel patro kaj patrino. Kaj eble ili havos infanojn kaj la kastelo plenighos de bruoj de etaj kurantoj kaj la klakado de iliaj ludiloj?

Do, la kastelo ekvivos! Sed la liliputaron iom ghenis la penso, ke la "Ladskatolo" - ilia shercnomo pri la Timida Kavaliro - kaj la Grafino havos infanojn. Imagu, ke en la fora estonteco duondeko da ploregantaj infanachoj nokte kurados en la torche prilumigataj koridoroj de la kastelo, malhelpante la dormon de la liliputoj ghis la matenaj horoj! Post mallonga diskuto kun la Grafino pri tiuj chi timigaj perspektivoj ili retransvilighis. Ili decidis, ke



ili vice kvietigos la infanojn. Ili povos ekzemple sidi en la luliloj, kanti lulkantojn kaj legi siajn biografiojn al la etuloj ghis kiam tiuj endormighos.

La ideon oni unuanime subtenis, kaj la liliputoj unuanime decidis kunefiki, por ke la kastelo plenighu de infanoj, iliaj vochoj kaj bruoj.

Sed kia estu la geedzigha festo? Kaj kiuj cheestu? Kiel oni vestu sin? Fakte, kion oni faras kaj kio okazas en nupto?


Chu oni venigu pastron, sorchis(in)on auh reghon? Kaj kian efikon la okazontajho havos sur la vivon de la liliputoj? Novaj kaj komplikaj demandoj pripensigis la liliputojn kaj igis iliajn malgrandajn vizaghojn tute seriozaj. Unu afero estis certa. Pro chio tio ili devos multe labori, purigi kaj ordigi, elnaftalenigi festovestojn. Plej eble baldauh ili komencu kuiri frandajn festopladojn kaj sciigu la liliputaron de la najbara komunumo pri la onta festeno.

La blankaj leterkolomboj elflugu jam frumatene. Tiel la liliputoj decidis, kaj ghojkriante ili diskuris por pretigi al la Grafino kaj la "Ladskatolo" sukcesan kaj felichigan feston.

pagho 36

Flarsuloj kaj Kisruloj primetis la tablon de la festosalono por ordinara chiutaga mangho de la Grafino. Chifoje sur la longa tablo, kovrita de lintuko kaj lumigata de arghenta plurbranca kandelabro, staris arghentaj bovloj, pladoj kaj pletoj, nenomeblaj ujoj kaj ujetoj nenece luksaj.

Sur la pladoj kaj teleroj videblis multaj frandajhoj. Ili vaporis, siblis, rampis kaj odoris. Tio aspektis ekzote kaj apetitive. La manghajhoj devenis el maro, tero kaj aero. La vidajho tamen teruris la Grafinon. Tian abundon da nutrajhoj shi deziris neniam plu vidi. Krome, shi ne plu emis manghi vivulojn, kaj shi ne shatis manghi sola. Feliche baldauh shi ne plu bezonos tion fari. Venos ja viro en la domon. Tiaj chi pensoj plenigis shian kapon, kiam shi gustumis la lofion, trufojn kaj la specialajn laponiajn terpometojn. Sian




gorghon shi gargaris per koakulighinta acidlakto kaj lama lakto. Chifoje sur la tablo troveblis nek "mämmi" (dolcha finna paskodeserto el malto kaj sekalo) nek nigraj sangokolbasoj, sed tie tamen troveblis aliaj finnaj frandajhoj, kiaj la granda ronda pano farchita per koregonoj kaj la supo kuirita el terpomoj kaj sangokrespoj.

Sed tion shi ne povis shanghi, ke mangho sen kompanio estas mangho sen sentoj, kaj manghajhoj sen sentoj ne bongustas.

Flarsuloj kaj Kisruloj metis sur la turno-platon de la trumpet-gramofono diskon de la muziko plej amata de la Grafino. Jussi Björling, finna operkantisto, kantis pri Kristnasko. La argildisko hejmece knaretis. La kurioza ehado de la latuna lauhtigilo de la gramofon strechita per risorto nur pliigis la charman efekton. La Grafino singultis kaj suspiris. Shi tute deprimighus, se shi ne memorus la venontan feston kaj la ekziston de la Timida Kavaliro! Verdire soleco povas frakasi homon. "Kunulo nepre nepras", pensis la Grafino! "Voston mi levu, ech se per fibolo!" En tiaj kuraghigaj pensoj la Grafino finis sian manghon kaj direktis siajn pashojn al la buduaro por siesti." La maljuna patrino de la Grafino siatempe instruis la knabinon, ke shi chiam post mangho iomete dormu. "Se vi ne faros tiel, la manghajhoj kredos sin falintaj en leporan stomakon!" Tian dirajhon la panjo ripetadis post manghoj.

Kvankam estis agrable esti Grafino, la Grafino intermite rememoris sian Pirolan vivon. Shiaj memoroj pri tiu vivo estis kiel songhoj, kaj shajnis al shi, ke shi kvazauh rigardus iun pejzaghon tra nebuleto.

La Grafino ne estis tute certa, chu shia Pirola vivo estis nur songho. "Nu, estu kiel ajn, iel tio tamen estas!" opiniis la Grafino kaj ekdormis en sia enorma litego sub la songhoteksajho, inter steloj, sunoj kaj planedoj, kiujn gardis la orumita aglo.



LA FESTO

La Grafino kaj la Timida Kavaliro jam sciigis la kastelanaron pri siaj gefianchigho kaj geedzigho.

La festo omaghe al tio estos neforgesebla. La orkestro de la Flarsuloj kaj Kisruloj tage kaj nokte ludadis. Shajnis, ke ili neniam lacighos de la muzikado kaj dancokirloj. De la tuta proksimajho alvenis festontojhomoj. Venis kamparanoj, liliputoj de la apuda komunumo, bestoj el la arbaro. La kulmino estis la Orienta Cirko.

Unue la cirkodirektoro venis nur peti helpon, char rompighis la lagro de unu el la veturilradoj kaj sen forghisto ili ne povos ripari ghin.

La Grafino afable pretis helpi, kaj la Flarsuloj kaj Kisruloj ardigis la forghofajrejon kaj kune martelante riparis la veturilon.


La cirkon fakte sendis la Bona Feino. Shi celis honori la feston per prezentado de plej mirindaj kaj distraj programeroj. Nerimarkate de la Grafino, la Bona Feino observadis chiujn shiajn agojn kaj kontribuis al tio, ke la aferoj glate kaj ghuste disvolvighis.

Jen kio sekvis: la shnurdancistino akrobatis vertighe alte, la tranchil-jhetisto jhetadis siajn akregajn ponardojn kaj instruis al la Grafino la dancon de sep glavoj. La cirkobestoj prezentis lertajhjojn, kaj la drola delfeno en sia naghkuvo saltigadis pilkon surnaze kaj kalkulis ghis sep en ok lingvoj nauh fojojn!

La parolanta papago rakontadis maldecetajn humurajhojn en esperanto, kiu estis la oficiala lingvo de la cirko. La gajega kaj petolema zebro subite demetis sian noktochemizon kaj ekdancis sur la festotablo inter la frandajhoj. Sur vitra tablo la serpento montris sian plej malfacilan trukon: Ghi englutis sin mem ekde la vosto kaj reaperis el nigra buleto ne pli granda ol fekero de leporo.

pagho 41

La liliputaro en sia medidad-chelo priparolis la lastatempajn okazintajhojn de la kastelo. Unuanimaj ili estis pri tio, ke la kastelo bezonis viron inter sia




loghantaro. Volonte ghuste tian iom timigan fortikulon, kia la fortega Timida Kavaliro ladskatol-aspekta. Ech ne la knarado de lia rusta kiraso ghenis la Flarsulojn kaj Kisrulojn. Ili agnoskis, ke la knarado igis ilin senti sin pli sekuraj.

La Ladskatolo, kiel la liliputaro afable nomis la Kavaliron, jam iel apartenis al la ilaro de la kastelo. Li helpadis la liliputaron en chiuj laboroj, kiuj postulis forton. Kaj tiaj taskoj abundis: martelegado, tirado de plugilo ktp. En la agrokulturo la virego nepre bezonatis: kvankam la liliputoj povis rikolti terpomojn po unu, ili ne kapablis levi faskegojn da falchita herbo sur sekigilojn por fari fojnon por Egotrip. Ili provis ligi la faskojn en garboj kaj stakigi tiujn, sed tio evidentighis laboro tro temporaba al liliputoj.

La Timida Kavaliro laboris sur la tegmento de la kastelo. Li tute renovigis ghin. Ankauh la muntado kaj riparado de akvotuboj postulis multan tempon. Aldone, li devos renovigi ankauh la defluigan tubaron. Al la Kavaliro shajnis, ke kiam finighis laboro en unu loko, tuj aperis farendajhoj en alia loko. "Eble la vivo chiam tias?" plupensis li, foliumante la korektitan eldonon de la Manlibro de Chiuj Kavaliroj.

Kiam la aventurojn sopirinta "Ladskatolo" pripensis sian antauhan vivon, li ne deziris rehavi ghin. La vivo de kavaliroj povas esti tre teda. Precipe se nenio okazas. Veran aventuron viro renkontas nur unu fojon en dek jaroj, proksimume. Dum la aliaj nauh jaroj li tedighas kaj enuas pro nura atendado, kaj nun li tion trovis stulta.

En la kastelo tamen chiam troveblas io por fari. Krome, la Grafino estas persono rava kaj mistera. La Timida Kavaliro supozis, ke dum sia tuta vivo li ne ekscios la plej profundajn pensojn de tiuj sorcha homo. Ekzemple la libro pri Rejko sur shia noktotablo - pri kio ghi temas? Chu mallongigo de Rejkjaviko?



Ne povas esti! Chu temas pri kuracado, sed kia? Oni ja devas agnoski, ke ne chio kompreneblas. La Kavaliro subtusis en sia kirason, kiu shajnis iom malplena, char pro la vegetaranaj manghoj de la pasintaj tagoj li certe shrumpis. La ehho de la tusetto longe kirlighis ie che lia stomako.

Pensi pri tiaj aferoj kaj brave finfari laborojn estis multe pli fruktodone ol dauhre serchi aventurojn. La Timida Kavaliro decidighis kontentighi pri sia situacio.

pagho 43

La prezentejo de la Orienta Cirko jam estis preta. La cirkanoj fosis grandan truon en la teron kaj konstruis en ghi naghejon por la delfeno. En vertighodona alto super la fosajho, sur du bambuaj stangoj, strechighis la shnuro de la shnurdancistino.


El la bestoveturilo lauh provizora ponteto elmarshis kiel eble plej kuriozaj estajhoj: unukorna shafo, trighiba dromedaro kaj tamburanta elefanto. La dancanta zebro aspektis tre amuze, kaj la delfeno senchese ripetadis en esperanto, la oficiala lingvo de la cirko: "Mi nomighas Pipi kaj mi estas lerta besto."

La cirkodirektoro en nigraj frako kaj cilindra chapelo impone rondpashadis, kaj liaj atentemaj okuloj pririgardis la starigadon de la cirko. Tio tute ne estis malgranda laboro. Akcidentoj ne devis okazi, kaj chio devis esti bela kaj pura, kiam la programo komencighos. Lia shvela nazego rughis pro ekscito.

Al la direktoro malplachis precipe la disjhetado de bombonpaperetoj sur la maneghon: " Puro kaj ordo al sato la pordo", li kutimis diri. La dirajhon la

bestoj ne komprenis. Kiel puro ligighas kun pordo kaj kio estas tiu "sato"? "Ne elcherpighos demandoj de demandemuloj", kriis la petolema simio sed ne chesis ludi la akordionon.

En la cirko chiuj partoprenas en chio. La akrobata rajdisto en sia libertempo portas benkojn kaj helpas starigi tendojn. La marvirinoj purigadas, kaj la



bestoj laboras kiel gardistoj.

Ofte la cirkanoj vivas kune sian tutan vivon. En la cirko trovighas ankauh infanoj, kiuj naskighis sur la pajlajho de la bestostalo, ekzemple sur la krurojn de dresita leono, kiu tuj brakumas ilin. La disciplino en la cirko povas shajni tro rigora al eksterulo, sed ghi estas deviga, se oni volas, ke la rondvaganta kolektivo funkcii kaj ne okazu akcidentoj.

En la cirko chiuj chiam solidare klopodas kaj chiuj defendas chiujn. Ili kunagas kiel granda rondo familia.


pagho 46

Venis la granda vespero! Venis la momento, al kiu oni sin preparis de pluraj tagoj! Chio jam estis preta. La spektantoj sidis sur benkoj faritaj el bretoj, unuj shtupeton pli alte ol la aliaj. En la spektantejo regis profunda silento, kiun interrompis nur la pepoj de la papago de la Magiisto. La obeza rughpufa cirkodirektoro en sia festovesto pashis al la mezo de la per segajho kovrita manegho.

Li solene riverencis kaj diris: "Bonan vesperon, miaj karaj geamikoj! La Orienta Cirko dauhrigas jarmilajn tradiciojn, kaj nun ni deziras reciproki la grandan afablecon, kiun ni chi tie ghuas. Ni prezentos al vi trukojn kaj akrobatajhojn unikajn en la tuta mondo: nekredeblan suplecon, iluziojn, jhongladon, ventroparoladon kaj aliajn mirindajhojn!" Samtempe la orkestro lauhtege ekludis fanfaron kaj enmarshis la artistoj por saluti la spektantaron.

La Grafino forte premighis al la jhus oleumita kiraso de la Timida Kavaliro, tiom streche ekscitita shi estis. La jukiga atendado bolis inter la liliputaro, kiuj sentis sin kvazauh en formikejo. La publiko aplauhdis, eligis ghokriojn kaj kunfrapis la manojn post chiu programero, kiuj ighis pli kaj pli temeraraj kaj mirigaj.

Du fratoj fajroglutistaj elblovis flamantajn korojn en la chielon, Princino Alico transkapighadis sur la alte strechita shnuro kaj tradancis serpentan



silkrubandon. La zebro amuzis la spektantojn per surkapstarighoj kaj surtabla


twist-danco en noktochemizo. La papago rakontadis maldecetajn anekdotojn en esperanto, kaj la liliputaro klakfrapis la manojn. Ili ja malofte auhdis fremdulojn paroli ilian hejmlingvon.

La tranchiljhetisto sorbis la magian pocion proponitan al li antauh la jhetado kaj tute konsternighis, kiam la siblantaj ponardoj akurate trafis la celojn. ("Ho, diris la tranchiljhetisto je trafo!") "Ankauh mi provu tion", kashpensis la Timida Kavaliro. "Tio ja estas tute alia afero ol sin jheti kun lancho etendita kontrauh ventomuelilojn!" li plupensis, citante la korektitan eldonon de la Aventurmanlibro de Kavaliroj.

La tempo flugrapide pasis. Noktighis jam, kaj la programo finighis. Post la jhus viditaj mirakloj la realo shajnis iom stranga. La Timida Kavaliro kaj la Grafino retirighis en sian buduaron. Iom poste de tie auhdighis ladeca bruetado de la trumpetgramofono. De la rusta grincado oni povis konkludi, ke la paro en la krepuska chambro dancis valson, malantauh la pezaj kurtenoj kaj kristalaj fenestroj. Chiuj estis lacaj sed felichaj. Ne malplej la novgeedzoj: la Grafino kaj la Timida Kavaliro.

pagho 51

La kastelo plenighis de gaja agemo. Oni okazigis festojn, kaj la manghotabloj preskauh shancelighis sub la pezo de bonodoraj manghajhoj. La ekoparfumo bone vendighis, kaj pli kaj pli da laboristoj estis dungataj por la laboratorio: kemistoj, laboratoristoj, vendistoj ... Por la ghardeno oni dungis regulan prizorganton kaj por la lamostaloj oni dungis fortikajn altkreskajn homojn kiel helpantojn al la Flarsuloj kaj Kisruloj. Entute la vivo en la kastelo farighis eventoplena kaj felicha. La Grafino kaj la Timida Kavaliro estis beataj. Li jam ne plu estis same timida. De tempo al tempo li ech demetis sian kirason, ech antauh ol dushi sin auh bani sin en la sauhno.



La Timida Kavaliro iom post iom rekomencis siajn chiutagajn laborojn. Li riparadis likantajn tegmentojn, forghis novan pordegon, per kiu li anstatauhigos la rustintan. Pliaj laboroj farendis en la grenodonaj kampoj kaj en la lamostalo. Ech ne granda aro de liliputoj kune povis uzi la plej pezajn kultivilojn kaj forghmartelojn. Certe ili provis, kuraghigante sin en la strebado per furioza kantado de laborkanzonoj.

Jen kaj jen la liliputoj malstreichighis kaj aranghis grandiozajn festojn, kie oni dancis surtable kaj naghis en kaldronegoj, kies akvo havis la saman temperaturon kiel la chambroj. Ili treege shatis sidi sur panrostilo kaj atendi la momenton, kiam la varmega tranchajho elpafighos kaj jhetos la sidanton rekte en la kaldron-naghejon.

La Grafino oftege profitis de sia flugaparato por superflugi la tutan bienon. Al shi ege plachis la flugado. Ofte la Grothundo Reks sidis kiel navigisto malantauh shi, kun kaskedo surkape kaj strikte ligita per la sekureczonoj. Ghi rapide lernis lerte flugi imitante la artefikojn de la Grafino en la

shancelighema aparato. Kelkfoje ghi sekrete provis flugi ech memstare. (Shsh.. Al neni tiu diru!)

pagho 52


LA HEJMRATOJ KAJ ILIA SEKRETO

La malsovaghaj ratoj de la kastelo havis sekreton. Ion tute mirindan ili ja auhdis de la chekastelaj korvobirdoj , kaj por pripensi tion ili retirighis en la librejon de sia plej interna nestaro.

Ili neklarigeble antaushentis, ke la vivo en la kastelo shanghighos. Ghenerale gefianchigoj kaj geedzigoj strange efikas, tiel ke la novgeedzoj decidighos patrini kaj patri kaj havigos bebojn al si...

La ratoj opiniis, ke ilia vivo farighos problema, se ladskatolecaj bru-etoj plenigos ech unu koridoron. Kiel oni povus dormi en tia bruoj? La aferon la ratoj esploru prefere tuj ol senprokraste.

Helpante sin per la lerniloj de sia librejo la ratoj provis kompreni la



miraklojn de naskigo kaj enmondigo de posteuloj.

De chiam ili kredis, ke chiuj ratoj kaj bestoj pli malgrandaj ol ili generighas de malnovaj chifonoj forjhetitaj en angulojn kaj ke sammaniere naskighas ankauh cimoj kaj blatoj. La ratoj estis spertaj pri tiaj aferoj.

Sed pri la enmondigo de homidoj ili havis ech ne scieton. Chu la idojn alportas iu granda birdo? Auh chu estus vera la t.n. margarinuja teorio? Kaj kio do TIO estas? Chu de ili oni kashis iun grandan kaj gravan sekreton ?

Kaj se iu granda birdo alportas la bebojn, KIEL ghi portas ilin, kiam ghi flugas? Kaj chu la bebetoj timas, kiam ili lulighas en malnova shalo nodita al la beko de birdo shancele fluganta en la bluo de la chielo? La ratoj konkludis, ke almenauh ili timus tian flugvojaghon.

(Saliko lähetti kolme viimeistä sivua. Puuttuvat aikaisemmasta tekstistä.

Korjaa vielä "PUUHKA" –sana koko teokseen.

pagho 54

EN LA BUDUARO

En bela somera vespero la Grafino trankvile sidadis en sia dormochambro. Estis tiel malvarmete, ke shi plenigis la fajrejon per pina gudr-odora brulligno kaj ekbruligis ghin. Aldone shi ekbruligis kelkajn kandelojn.

La pezaj velurkurtenoj de la kastelo estis belaj, sed ili malhelpis la lunlumon enpenetri en la altajn chambrojn. "La lumo estas grava. Sen ghi ne estas vivo!" pensis la mastrino de la kastelo.

Shi iris preni el la kelo de la kastelo botelon de tre malnova kaj valora vino kaj verghis iom da tiu nobla trinkajho en sian kristalan pokalon.

Sur la trumpetgramofono strechebla per risorto ludighis 78-rivolua argildisko. La vocho de la itala majstro Enrico Caruso plenigis la chambron. La Grafino rememoris la komencon de la somero kaj la Orientan Cirkon. Sur sia kverka tableto kushis malferma akvarelibro, en kiu ŝi gardis la plej bonajn memorojn de sia vivo. La libro enhavis pli ol cent akvarelojn pentritajn de ŝi. Trafoliumante ĉi tiujn bildojn pri siaj memoroj ŝi farighis dormema kaj ŝiaj palpebroj komencis fermighadi. Tial ŝi decidis eniri la banchambron kaj post bonodoriga aromumado ŝi enlitighis.

La Grafino dormis tra la tuta nokto distrata de songhoj, kiujn ŝiaj belaj memoroj orumis. Ŝi songhis, ke ŝi estas malgranda knabineto kaj kajto levas ŝin supren en la altan volbon de la ĉielo. La songho ŝajnis kurioze reala; kutime tiaj la songhoj ja ŝajnas esti.

La sekvan matenon, kiam la fruaj sunradioj penetris en la buduaron el inter la veluraj kurtenoj kaj tiklis la nazeton de la Grafino, ekkazis mirindaj aferoj.

La Grafino ternis kaj vekighis. Ŝi auhdis strangajn bruojn kaj sonojn de ekstere. Unue ŝi ne estis tute certa, kie ŝi kushas kaj kiu ŝi estas.

Iom post iom la okazintajhoj tamen revenis en ŝian memoron, kaj la nebulajn songhovualojn anstatauhis firmaj realajhoj. Estis nova tago!

pagho 55

LA MIRAKLO DE NASKIGHO

La mateno estis bela kaj la suno ĵus levighis. La Grafino larghe malfermis la fenestron de sia dormochambro. De sur la ĉielo auhdighis stranga frapegado, kvazauh flugilbatoj kaj rukulado de iu granda birdo.

La Grothundo Reks demande alrigardis la Grafinon, kiu surprize rigardis al la ĉielo.

Ho, kion ŝi vidis! Alproksimighis enorma Am-Kolombo portanta en sia beko amindan virbebon, kiu tute klare svingis sian maneton al la Grafino kaj babletis: mama mma mamma.

Samtempe la liliputaro, kiu jam sciighis pri la afero, komencis ludi festomarshon kaj la koruso de la Flarsuloj ekkantis charmegan kanton:

Venu Amatino mia, venu kun mi trans la montojn
kaj la Maron de Sapiro.

Plenigu per Amo
la plej forajn angulojn de mia animo
kaj forigu el ili la ombron de sopirado...

Via koro estos eterne mia
kaj la ritmo de ĝhia batado
estas la forto subtenanta nian Vivon.

Venu Amatino mia, kaj plenigu
la oran pokalon de mia sopiro,

elspiru la spireton, kiu igos la Vivon dauhri,
kaj mankareso forigu la doloron..."

Zefiro forblovis la finon de la strofo al birdoj , kiuj ghin ame ripetadis kaj
la floroj de la herbejo plibelighis per ghi.

pagho 57

Malsupre de la chirkauhfluganta birdego, sur la florumita korto de la kastelo,
liliputoj dancis la Malrapidan Valson de Ana-Matilda. Kelkajn tagojn pli frue la
Timida Kavaliro konstruis sur la herbejon tre malgrandajn dancoplankon kaj
orkestran podion. Audighis polonezoj kaj sotizoj. Hambaj tonoj vibrigis la
aeron. De sur la chielo oni auhdis kriojn de la granda birdo. La domkorvoj Luno
kaj Nokto estis alfiksantaj Grafinan blazonon al la jhus forghita kastelpordego
kiel signon pri Nova Vivo.

La Grafino preskauh ne kredis pri la vereco de la vidajho. Shi ekfrotis siajn
okulojn, sed la vidajho ne shanghighis. Chion tion chi shi i nun simple devis
kredi. La tute jam maldorma Grafino suriris la balkonon, etendis siajn brakojn
kaj prenis al sia brusto la rozvangan infanon alportitan de la birdego.
La birdo donis al la Grafino birdkiseton che la orelo kaj etendis siajn
gigantajn flugilojn. Per kelkaj fortaj flugilbatoj ghi malproksimighis kaj
farighis nur punkto pli kaj pli malgrandighanta en la forajho.

La Grafino per sia mantelo shirme envolvis la infaneton kaj pepante kuriozajn
aferojn al ghi shi reiris en sian buduaron, kie shi estis atendata de la Timida
Kavaliro kaj ligna lulilo memfarita de la liliputoj. Ghia interno estis
ornamita per bobenpuntajhoj kaj floretoj , kaj ghi ankorauh odoretis je ligno.

Tiel chi la vivo en la kastelo kontinuus generacion post generacio. La samaj
scenoj de klopodemo kaj laboro estis ludataj denove kaj denove, la samaj teneraj
vortoj eldirighis en la kvieto de la nokto, kiam la Matenstelo kaj Lunarko
atestis la Amon kaj Intimecon.

Sed plej grave estas, ke felichaj vivo kaj harmonio pludauhris en tiu chi
fortreso de paco kaj amo.

Kaj tiel finighis la rakonto.

(Kaj nun jam finighis la fabelo)

(Kaj jen la fino de la fabelo)

VALITSE SOPIVIN LOPPU!

VIRHEITÄ TEKSTISSÄ. OSA KORJATTU.

Eraroj en "La Grafino kaj shia fantasta vivo"

trovitaj antauh la 26a de aughusto, 2006

p.5

foino kaj foinejo devus esti fojno, fojnejo ,sama eraro sur p.20
Sentante sin malvarma - Chu estus pli bone "Sentante malvarmon"?
Nenion tiel belan la leprodo neniam...vidis. Forigu "neniam"!

p.8 elbushighis devus esti elbushigis

p.10 emeraldoj devas esti smeraldoj, same aliloke, ekz. p. 32

p.11 baldekenlito devas esti baldakenlito

p.13 en la mezo de la Esperanta pagho mankas kelkaj linioj, kiuj
legeblas nur en la finna pagho:

En la grotaro trovighas malgrandaj biblioteko, manlaborejo kaj eta
kuirejeto por matenaj manghoj/matenmanghoj.

(La Esperantaj linioj malaperis eble dum la enpaghigo)

p.20 tria vorto: ne Kirsruloj sed Kirsuloj!

p.36 Jussi Björling estas SVEDA operkantisto, ne finna. Saliko provis
klarigi al fremdlandanoj, kio estas tiu eble nekonata i sinjoro, sed
shi mem eraris. Pardonu! La finna pagho havas nur lian nomon.

p.39 tria linio: La festo omaghe al tio estis (NE:estos)

finna p.41 sube mankas kelkaj linioj: Näiden asioiden pohtiminen ja
toteuttaminen oli paljon antoisampaa kuin jatkuva seikkailujen
etsiminen. Ujo Ritari päätti olla tyytyväinen tilanteeseensa.
(supozeble la auhtoro, kiu mem enpaghigis la libron, havis malfacilajhojn)

p.52 kemistoj devus esti kemiistoj

Venas al mi demandoj kaj proponoj, al kiuj mi provas respondi lauh miaj
kapabloj, sed la supraj estas mistajpajhoj auh rezultoj de miaj aliaj
mankoj. Venas ankauh dankoj. Estas amuze legi, kiaj aferoj - chuh en la
lingvo, chu en la enhavo - malplachas al legantoj.

Raita Pyhälä 25.8.2006

